

Esperanto Somera Festivalo

Shallowford House

4 - 8a aŭgusto

Gvidas: Jack Warren

Gastgvidanto: Paul Gubbins



Ŝalofordo estas belega loko por somera festivalo: kampara domo, ĉirkaŭita de belaj kaj trankvilaj ĝardenoj, proponante komfortajn ĉambrojn, bongustan manĝoprovizon kaj la ŝancon por 5 tagoj pensi, paroli kaj vivi en la internacia lingvo. Krom intensa studado en malgrandaj grupoj, estos muziko, ludoj ekstere kaj endome kaj ekskurso al la Esperanto-Domo en Barlastono. Venu al ni por ĝui studferion neforgeseblan.

- Jack Warren

Ĉe la Somera Festivalo



Paul Gubbins estas esperanto-aŭtoro, redaktoro, ĵurnalisto kaj instruisto, membro de la Akademio de Esperanto kaj prezidanto de Esperanto-Asocio de Britio.

Paul studis lingvojn (precipe la germanan) ĉe la Universitato de Manĉestro, Anglujo, kaj ĉe Queen's University, Kanado, kie li doktoriĝis pri germana literaturo en 1978. Li laboris profesie kiel ĵurnalisto; poste kiel lingvo-instruisto ĉe universitato en nord-okcidenta Anglujo.

Li esperantistiĝis en 1984 kaj komencis kontribui artikolojn al la internacia revuo *Monato* en 1986. En januaro 2011 li iĝis ĉefredaktoro.

“En la **progresinta** grupo ni pritraktos diversajn tekstojn de vidpunkto kaj de gramatiko kaj de enhavo. La tekstoj inkluzivos aktualaĵojn, ĉu pri mondaj, ĉu pri esperantaj aferoj, ĉerpitajn ĝenerale el revuoj kaj magazinoj. Ni esploros kelkajn aspektojn de esperanta literaturo, ekzemple surbaze de mallongaj poemoj. La celo: konversaciigi kaj, super ĉio, amuziĝi!”

La kotizo kovras tranoktadon kaj ĉiuj manĝojn kaj refreŝigaĵojn, kontinent-stilan matenmanĝon, dupladon tagmanĝon kaj tripladan vespermanĝon, matenkafon kaj posttagmezan teon.

Troviĝas trinkejo en la televidĉambro kaj retaliro tra la tuta konstruaĵo.



“En la **progresanta** grupo studantoj havos la okazon plifortigi sian komprenon de Esperanto per gamo da diversaj lingvaj ekzercoj. Tiuj estos precipe parolaj kaj kompreneble ankaŭ celos amuzon. Kromaj temoj pritraktataj estos kiel plej bone uzi vortaron, internaciaj aktualaĵoj, kiujn vestojn surhavi kaj la vivoj de certaj famaj - tamen nebritaj - homoj.” - **Jack Warren**.

Pliaj eblecoj

Se vi dezirus ripozan semajnon en kvietaj ĉirkaŭaĵoj vi estos tre bonvena veni al Shallowford por simpla *feriuma semajno* kunvenante kun la grupo por manĝi kaj la distra vespero.

- Ni uzos la kroketejon (laŭ bonpermeso de la veteroj).
- Ni kantos, do kunportu viajn petojn.
- Vesperludoj disponeblas, inkluzive de la ĉiam populara surplanka Skrablo!
- Kunportu muzikilon aŭ helpilon se vi dezirus koncertumi aŭ distri.
- Viv partoprenos la eventon kaj aranĝos surloke libroservon.



Biblioteko Butler

Se vi veturos aŭte la Biblioteko Butler foras nur 15 minutojn. Geoffrey King, nia bibliotekisto, restos tie dum tiu semajno kaj afable helpos vizitantojn.

Kosto

£234 por EAB-membroj

£260 por ne-membroj

inkluzive de ĉiu manĝo post alveno la lundon kaj antaŭ foriro la vendredon - sub-26 jaraĝuloj rajtas peti finanĉan helpon ĉe nojef.org

Kiam

Alveno kaj registrado okazas lundon je la 12:00. Lunĉo sekvas. Foriro okazos post lunĉo vendredon.

Kiel atingi

Per trajno iru ĝis haltejo Stafford. Poste vi bezonos taksion. Kontaktu Viv por antaŭarangĝi taksiservon kaj dividi kostojn kun aliaj.

Kiel mendi lokon

- Sendu ĉekon al EAB ĉe Esperanto House, Station Road, Barlaston ST12 9DE

- Sendi retmesaĝon al Viv ĉe eab@esperanto.org.uk por ricevi ligan por pagi perrete.

La 54a ĉiujara Esperanto
Somera Festivalo:
Shallowford House
Shallowford
Stone
Staffordshire
ST15 0NZ

